

Recenzo de *El la vivo de Bervalo sentaŭgulo* de Louis Beaucaire
en la kolekto Stafeto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 586, 1975.01.01 & 04

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En sia kolekto **Stafeto** doktoro Juan Regulo ĵus aperigis novan libron de Louis Beaucaire, kiu, kiel decas por tiu aŭtoro, estas maldeca epizodaro. Ĝia titolo : *El la vivo de Bervalo sentaŭgulo*.

A.- Vi eble esploris la landon Bervalo per la lego de la unua libro de Louis Beaucaire : *Kruko kaj Baniko el Bervalo*. Temis pri antologio de maldecaj ŝercoj. Malmultaj libroj tiel rapide elĉerpiĝis. Sed nun ĝi estas reaĉetebla dank'al la eldon-aktiveco de UEA.

Cl.- La dua libro de Louis Beaucaire restis je la nivelo de la maldecaj rakontoj. Sed ĝi tamen ne vekas la ridon kiel *Kruko kaj Baniko el Bervalo*. Temas pri krudaj aventuroj, kies kaŝita celo estas antaŭ ĉio mokema karikaturado de la esperanto-socio. Kaj en la priskribo de la amoraj scenoj kaj pentrado de nia verda mondeto, mankas io : ĉu iom nuancitaj etosoj, ĉu malpli infanecaj transiroj. Ni lasas la stilistojn decidi. Almenaŭ la leganto tendencas rigardi la aventurojn de la bervalo sentaŭgulo kaj de lia amiko Kruko, kiel li rigardas tiujn de malbonkonduktaj knaboj, kies nura emo estas fulmrapide amori kun iu ajn virino : sen okupiĝi pri ŝia aspekto.

A.- Nia sentaŭgulo mortas la sabaton 2-an de septembro pafita de ĉasisto. Ho, tio ne okazas en la arbaro, sed en lito, en la geedza lito de ĉasisto, kiun li anstataŭis ne antaŭvidinte, ke li revenos tiel frue.

Cl.- Nia diboĉema bervalano tuj malkovris, ke la paradizo malsimilas al la priskribo, kiun donas el ĝi la puritanaj kristanoj. Tiu psiskribo de la transmondo, kie esperanto estas la interlingvo, ŝajnis al ni la plej bona parto de la libro de *Louis Beaucaire*.

A.- Tial ni nun citas erojn el ĝi :

Cl.- « Estas malfacile priskribi mian konfuzon, kiam mi retrovis min en tute nekutima stato de malpezeco. Mi ŝvebis en blueta atmosfero. [...] Antaŭ mi etendiĝis ia senfina murego, kies materialo ŝajnis nepalpebla miksaĵo el brilaj nuboj, vanila kremaĵo kaj holivuda kiĉa dekoracio. En ĝi faŭkis portalo, super kiu flagris granda surskribo : **PARADIZO**. Komence mi hezitis alŝvebi al tiu loko, pri kiu mi blasfeme ŝercadis dum mia tuta vivo. [...] Sed mian scivolon tiklis la surskribo en esperanto kaj ankaŭ la dolĉa muziko obtuze sonanta tra la nuba pordego. En ĝi estis ja klare rekonebla la melodio de **La Feliĉo** zumata de *Ramona van Dalsem* kun orgena akompano de *Toos Schoonman*.

A.- Iu fajfis tra la fingroj, kaj maljunulo vestita per longa noktoĉemizo aperis sur la stratusa sojlo. [...] Li signis al mi, ke mi alproksimiĝu, kaj diris al mi :

Cl.- Ave, domine. Quid expectas ante januam ? Ho ! Pardonu. Mi ne sukcesas perdi la malbonan kutimon paroli latine. Mi deziras al vi agrablan eternon. Eniru do en la paradizon !

A.- **Granda sankta Petro**, [...] vi verŝajne eraras. Mi ne apartenas al la justuloj, kiuj rajtas tiel rapide ĝui la eternan feliĉegon. [...]

Cl.- Vi mem eraras, kara eksa terano. Kiel multaj, vi havas malĝustan ideon pri la paradizo. Tio devenas de la oftaj mistradukoj kaj falsaj interpretoj de la sanktaj libroj. Rigardu mem miajn registrojn.

A.- Sur bretoj el nekonata ligno staris sinsekvoj da foliantoj, dekstre rozaj en la fako *PARADIZO* kaj maldekstre nigraj sub la rubriko *PURGATORIO*. Sankta Petro lerte kaptis roze binditan libregon, kaj lia montra fingro rapide laŭglitis la kolumnojn, dum li litaniadis :

Cl.- Baedeker, Baghy, Bakunin, Balkanyi, Balzac, Barbusse, Bartelmes, Bastien, jen, jen vi, konstatu, ĝuste super Beaufront. Ha ! Li estis punita je tri jaroj da purgatorio, antaŭ ol veni en la paradizon. Male vi havas tre bonajn notojn. Legu kion la Ĉefo skribis apud via nomo:

A.- « *Ŝatas vinon, bieron, brandon, spican manĝon, belajn virinojn, spritajn ŝercojn.* » Kaj la Ĉefo propramane substrekis : « *Bona esperantisto* ».

Cl.- Vi estas ja ideala kandidato al la eternaj ĝuoj. [...]

A.- Anĝelino Gabriela zorgis pri la vestado de nia heroo, kaj estas en la akompano de sankta Rabelezo, ke li malkovris la mirindan paradizan ĝardenon. Ekpaŝante sur vojeto serpentanta inter du riveretoj, apud arboj ŝarĝitaj de ĉiaj fruktoj, nia bervalano ekkriis : « *Sankta Rabelezo, tiom da neatenditaj strangaĵoj konsternas min, ke mi ne scias, per kiu demando mi komencu. La anĝeloj videble havas sekson kaj ne flugilojn. Ĉiuj loĝantoj parolas esperanton. Mi promenas kun vi en la paradizo, anstataŭ bruli en la eterna fajro de la infero.* »

Cl.- Ridetante, sankta Rabelezo interrompis lin : « *La infero tute ne ekzistas. Ĝi estas nur inventaĵo de senspritaj blaguloj. Kiel povus la Eternulo, kiu estas senlime bona, elpensi tian abomenaĵon por sia kreitaro ?* »

A.- Jes, sed mi meritas almenaŭ longan restadon en la purgatorio.

Cl.- *Tiu punejo ja ekzistas, sed, kiel sankta Petro jam klarigis al vi, ĝi estas destinita por alispecaj pekuloj. Finfine la teologoj devos iam revizii siajn praaajn doktrinojn kaj klare agnoski, ke la ĉiopova Kreinto provizis la homojn per kvin sensoj uzotaj dum la tuta vivo. La regula vartado de tiuj sensoj estas la sola kulto, kiun la Eternulo atendas de la homoj. Ĝi estas kvazaŭ prepariĝado al la paradizaj ĝuoj.* [...]

A.- Bedaŭrinde multaj teranoj ne scias tion. [...]

Cl.- *Jes, ĉiuj, kiuj malestimas la bonaĵojn de la surtera vivo kaj malhelpas siajn samtempulojn ĝui ilin, ne indas transiri post la morto rekte al la ĉiela feliĉego. En la purgatorio do restas pli malpli longe militistoj, vegetaranoj, ĉikanemuloj, klubkasistoj, jezuitoj, sadistoj, asketoj, politikistoj, teduloj, ktp.* [...]

A.- Kial oni ne avertas ilin ?

Cl.- *Ili ne kredus tion. La malhumileco blindigas ilin.* »

A.- Vi aŭdis eron el la ĵus aperinta libro *El la vivo de bervalo sentaŭgulo* de Louis Beaucaire.

Cl.- Parolis por la Svisa Radio gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !